

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ huhtikuu ♦ aprilo ♦ 2/2011



"Pado al plenumiĝo" (www.sxc.hu)



Kirja Zamenhofista suomeksi, s. 4

Nova estraro, p. 5 ♦ Nobla koridalo, floro de printempo, p. 8
Valamo-kurso, p. 11 ♦ Kopenhago, p. 12 ♦ Edzinportado, p. 12

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Robert Bogenschneider*

Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori. ✉ robog@gmx.de

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki. ☎ 044 3933 924 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilauhintaa/Prenumerationspris/Abonprezo: 22 e/vuosi/år/jaro

Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ 044 2642 742 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmogatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 330

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*

Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

Jukka Nikoskelainen, Pohjolankatu 11, 20100 Turku. ☎ 050 525 3745 ✉ juknik@utu.fi

Markus Sunela, Kalevan puistotie 16 B 23, 33500 Tampere. ☎ 040 768 5165 ✉ markus.sunela@iki.fi

Keith (Keke) Uber, Petter Wetterin tie 4 A 47, 00810 Helsinki. ☎ 040 413 4252 ✉ keith_uber@yahoo.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Robert Bogenschneider, Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori. ✉ robog@gmx.de

Börje Eriksson, Erkontie 24 C 11, 16300 Orimattila. ☎ 040 779 3487 ✉ esperarto@phnet.fi

Tiina Kosunen, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): FI11 8000 1700 2308 25 DABAFIHH (Sampo 800017-230825).

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:

FI66 8000 2005 9953 69 DABAFIHH (Sampo 800020-5995369) (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Officejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avooinna tiistaisin klo 17-19.

☎ 044 2642 742 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Internet: <http://www.esperanto.fi>



Naturo decidas, homo sekvas

La tagon antaŭ niaj vintraj tagoj, la 11-an de marto, trafis Japanion tertremo kaj ĝin sekvinta cunamo, mara ondego. La vasteco de la katastrofo estis en la unua tempo neklara.

Kiam ni sendis el nia kunveno nian esprimon de solidareco, oni timis totalan katastrofon kun milionoj da oferuloj. Nun ni scias, ke plej evidente pli ol 20 000 japanoj perdis la vivon – kaj el ili duono estas senspure malaperintaj: La maro ilin kaptis. Ĉu estas esperantistoj inter ili, ni ne certas. Ĝis mezo de aprilo laŭ Japana Esperanto-Instituto ĝiaj membroj en la trafita regiono estis en sekureco.

Post la plej akuta fazo la Japania katastrofo daŭros tre longe, el hom-generacia perspektivo – senfine. En la tertrema regiono Fukuŝima kvar elektroproduktantaj nukleaj centraloj estas tiel detruitaj, ke ili devas esti por ”ĉiam” izolitaj. Dume izoli ne sukcesas, kaj radianta materialo fluas el la difektitaj centraloj en aeron kaj maron. Savlaborantoj faras kiom estas ebla, sed la laboro estas pli heroa ol efika. Fukuŝima aliĝis al ĉeno de Harrisburg kaj Ĉernobil. Ni sentas la demandon, kie estos la sekva ĉenero, malgraŭ ke nia norda terpeco laŭesplore havas la plej solidan grundon en la mondo.

Japanio estas riĉa industria lando kun solida socio kaj funkcia ŝtata strukturo. Laboroj por savado kaj rekonstruado havas pli favoran perspektivon ol tiuj en alia insula lando trafita pasintjare de tertremego: Haitio. Ĝi estas tipa t.n. subevoluinta lando (aŭ, se preferi “politikan korektecon”, t.e. eŭfemismon, evoluanta lando). La nombro de mortintoj estis grandega, kaj elirpunkto por rekonstruado estis esence alia ol estas tiu en Japanio. Tamen signoj de

nova komenco estas videblaj. Internacia helpo estas malpli abunda ol en la komenco, sed des pli koordinita. Veraj memdecido kaj memestimo estas plej necesaj por stabilo kaj solido. Tia civitana socio espereble konstruiĝas nun en la postkatastrofa Haitio. Respublika prezidento jam estis elektita en demokratia baloto.

Manko de demokratio kaj sekve socia maljusteco naskis serion de politikaj renversoj en norda Afriko kaj Proksima Oriento. Regopovo estas kara al reganto, des pli kiam la reganto scias ke eksreganteco signifos ekrespondecon pri la faroj dum regado. Faroj, kiujn regantoj trovas bono kaj regatoj krimo, depende de ne nur principa vidpunkto, sed konkreta pozicio de homoj.

En verka momento de tio ĉi registaroj estas ŝanĝitaj en Tunizio kaj Egipto, dum en Libio furiozas civila milito jam de semajnoj. Ties partioj estas sendube maldemokratia registaro kaj tre malkohera opozicio. La ekstera mondo – Unuiĝintaj Nacioj per fizika, milita forto de volontaj siaj membroŝtatoj – klopodas malebligi terorismon kontraŭ civiluloj. Tiel ĝi aliĝas, eĉ se kontraŭvole, al unu partio de la konflikto. Neniu partio, ankaŭ kaj precipe ne la ekstera mondo, povas fieri pri sia rolo. Sen la industria mondo ne estus estinta profita negoco, interalie de armiloj, dum jardekoj. – Historiaj roloj ne estas difinitaj, eĉ ne difinotaj, ili estas difinad-ataj.

Ni en Finnlando estas benataj per stabileco mara kaj tersurfaca kaj ankaŭ sociekonomia (malgraŭ regula financa baraktado). Tio estu dirita nun, kiam en la plej lasta momento de la verkado de ĉi tiu teksto estis finita parlamenta baloto, kiu ŝanĝis la parlamenton pli ol iam depost 1945. La Baza- (aŭ ”Vera-) finnlanda partio fariĝis trie plej granda en la parlamento, ĝia grupo kreskis de 5 al 39 membroj. Ĝi gajnis ▷

ne per klara politika programo (vidu mian artikolon en EF 1/2011), sed per simpliga retoriko kontraŭ aferoj malpopularaj al homoj sentantaj maljuston pro plej diversaj kaŭzoj. Lingvopolitika starpunkto estas unu: Strikte kontraŭ la ŝtata dulingveco. Inter la elektitoj el tiu partio ankaŭ estas grupo absolute malaprobanta alvenon de eksterlandanoj kaj internaciaj solidarecon. – En la parlamento estas nun krom tiuj 35 ankaŭ cetere rekorda nombro da novaj vizaĝoj, 84 el la 200. Tamen, mi ne antaŭvidas ian tre radikalan,

kaj precipe ne danĝeran ŝanĝon. Pluaj komentoj sekvos (kaj bonvenas ankaŭ el eksterlando) en venonta gazeta numero kaj nia retejo.

Ĉirkaŭ verka tempo estis la kvindeka datreveno de la unua (?) homa spacveturo. La simpatia kosmonaŭto Jurij Gagarin esprimis sin pri siaj impresoj en tricentkilometra alteco proksimume jene: “Vidante la terglobon el la spaco mi miregis pro ĝia beleco. Tian mondon havas ni homoj – ni zorgu pri ĝi. Ne detruu ĝin!”


Tuomo Grundström

Ludwik Zamenhofin vaiheet ja elämäntyö

Suomen Esperantoliiton Tampereen talvipäivillä julkistettiin ensimmäinen laaja suomenkielinen esitys esperanton laatijan elämästä ja elämäntyöstä. Tämän 154-sivuinen kirja on suomennos ruotsalaisesta alkuteoksesta täydennettynä mm. Zamenhofin omilla keskeisillä kirjoituksilla,

kuten näet oikeista takakan- nen esittelytekstistä. Huomaa sen viimeinen merkintä: Kirjastoluokittelu. Tunnus ei ole ”keinotekoisien kielten” 89.991, vaan 99.18: Elämäkertojen kielitieteilijät ja kirjallisuuden tutkijat. Teos sisältää kielen ja sillä luodun kulttuurin, mutta myös ja varsinkin sen aatehistorian esittely.

Tohtori Zamenhof ja kansainvälinen kieli



Tämä kirja on koottu kahdesta lähteestä. Ruotsalaisen alkuteoksen on pääosin kirjoittanut Leif Nordenstorm. Osa tekstistä on Christer Lörmemarkin. Tuomo Grundström on suomentajana ja toimittajana muokannut alkuteosta ottaen huomioon Suomen ja suomen kielen. Kappale 9 on kokonaan hänen.

Zamenhofin omat tekstit, kappaleet 10, 11 ja 12 on käännetty Aleksandr Korženkovin esperantoksi julkaisemista laajoista ja syvällisistä aate- ja henkilöhistoriallisista teoksista. Hän on laatinut myös omana kappaleenaan olevan tiivistetyn Zamenhofin elämäkerran. Kirjan lopussa on tekijöiden ja toimittajan käyttämän kirjallisuuden ja muiden lähteiden luettelo.

Yritykset ylittää kielimuurit ja laajentaa ymmärtämystä rajojen yli ovat tärkeä osa viime vuosisadan kansainvälisyyttä. Esperanton ja esperantoliikkeen aatehistoriaa esitellään erinomaisesti tässä kirjassa. Tekijät piirtävät kiinnostavan kuvan Zamenhofin omista poliittisista ja uskonnollisista lähtökohdista, hänen toiveistaan ja pettymyksistään. Kirjassa on myös kielen johdantokurssi ja kuvaus sen käytöstä ja levinneisyydestä.

Daniel Tarschysin esipuheesta

Daniel Tarschys on Tukholman yliopiston politiikan tutkimuksen professori ja Ruotsin kuninkaallisen tiedeakateman jäsen. Hän on ollut Ruotsin valtiopäiväedustajana 1978 -82 ja 1985 -94. Euroopan Neuvoston pääsihteerinä Tarschys toimi 1994 -99.

Suomen Esperantoliitto ry.

Käännös- ja toimitustyötä on tukenut Suomen Kulttuurirahaston Terttu Östermanin rahasto.

ISBN 978-952-8929-03-3

99.18

Kirjan saa hintaan 15 euroa (sisältää lähetykskulut) lähettämällä tilauksen osoitteeseen eafmendoj@esperanto.fi tai Suomen Esperantoliitto ry., Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, tai puhelimella 044 264 2742 (viesti vastaaajaan).

Vintraj Tagoj en Tampere

La tradiciaj Vintraj Tagoj de Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) okazis 12–13 mar 2011 en Tampere. La gastiganta societo Antaŭen festis sian 90-jaran datrevenon. La historion de la jubileanta societo prezentis en vortoj kaj bildoj Jukka Laaksonen, kiu dum dudek jaroj estis prezidanto. Li kaj aliaj aktivuloj, la nuna prezidanto Tapani Aarne, Sylvia kaj Veli Hämäläinen kaj aliaj, bone faris la kunvenajn aranĝojn.

Partoprenis 53 samideanoj. La vespera programo regalis per parola, muzika kaj kviza amuzo. Inter aliaj, Anja Karkiainen remontris siajn poeziajn talentojn, kaj ruslanda klasikulo kvazaŭ renaskiĝis: Vladimir Vysockij en

prezento de Andrej Teräväinen.

La jarkunveno de EAF reelektis Tuomo Grundström kiel prezidanton. Estraranoj estas Päivi Saarinen (vicprezidanto), Tiina Oittinen (sekretario), Paula Niinikorpi, Keith Uber, Markus Sunela kaj Jukka Nikoskelainen, vicaj Tiina Kosunen (kasistino), Börje Eriksson kaj Robert Bogenschneider. La estraro intergeneracia kaj internacia.

Dum la Tagoj aperis la unua ampleksa (150 paĝoj) Zamenhof-biografio en la finna lingvo, eldonita de la asocio. La agadplano difinas novan vortaron sekva granda eldona projekto.

Tuomo Grundström



En la Vintraj Tagoj de EAF en Tampere estis elektita nova asocia estraro; de maldekstre: Päivi Saarinen, Tiina Oittinen, Keith Uber, Tuomo Grundström, Jukka Nikoskelainen, Robert Bogenschneider, Börje Eriksson, Paula Niinikorpi. Sur la foto mankas Markus Sunela kaj Tiina Kosunen. (Foto kaj teksto aperis en la Ondo de Esperanto 4-5/2011.)

Sinprezento de Jukka Nikoskelainen

Mi esperantiĝis antaŭ 3 jaroj en 2008, kiam en la Popolinstituto Aurala komenciĝis nova Esperanto-kurso en kiu mi kaj mia edzino Eeva partoprenis. Ni havis tre bonajn kaj kuraĝigajn instruistojn kiuj inspiris nin studi Esperanton plue. Fakte ni interesiĝis pri Esperanto jam en 1969 ĉar Eeva havis kursokamaradon Simo, filon de Joel Vilkki. Li rakontis, ke en sia hejmo oni uzis Esperanton preskaŭ ĉiutage. Ni studis iomete Esperanton kiam estis elsendita la Esperanto-kurso "Via Dua Lingvo" en la finna radio.


Mi nek legis nek studis Esperanton dum la sekvaj 40 jaroj, ĉar mi devis koncentriĝi en mia profesio kiel kuracisto kaj universitata instruisto de interna medicino kaj infektaj malsanoj.



Krome mi havis grandan familion kun 4 gefiloj, kiuj bezonis multan atenton.

Mi partoprenis en la Valamo-kurso en 2008 kaj 2009. La monaĥeja atmosfero estas ideala por studi novajn lingvojn. Mia unua Universala Kongreso okazis en Havano en 2010. La kongreso estis tre sukcesa kaj agrabla sperto. Mi ŝatis konatiĝi kaj babiladi kun alilandanaj esperantistoj. Venontan someron mi partoprenos en la BET-kongreso en Latvio. Mi multe ĝuas aŭskulti la Esperantlingvajn elsendojn de Pola Retradio, kiujn mi ofte elŝutas en mian MP3-aparaton kaj aŭskultas poste. Esperanto kunportis en mian vivon multajn agrablajn aferojn kaj novajn interesajn amikojn.

Jukka Nikoskelainen



Ekspozicio dum Vintraj Tagoj pri la 90-jara Esperanto-societo Antaŭen.

En svensk föregångare i språkundervisning

Den välkända och erfarna språkläraren (engelska, tyska, esperanto) gav i september 2010 ut en fascinerande bok ”Esperanto...över 50 miljoner träffar”, som på svenska presenterar på ett färgrikt och charmerande sätt det internationella språket, som skapades av doktor Ludoviko Zamenhof år 1887. Boken bygger på författarens egna praktiska erfarenheter. Det är hans personliga skrivsätt som gör boken så lockande. Läsaren känner inte lust att lämna skickliga följeslagaren. Lars Forsman lockar med sin livliga och passionerade skildring av själva språket och av hur man undervisar och använder det i hela världen.

De, som nuförtiden är intresserade av det internationella språket esperanto, har inte så lätt att finna en trovärdig vägledning. Här har vi en föredömlig källa, som visar på ett obegränsat verksamhetsområde. Den är skriven på ett sätt, som alla kan förstå. De som inte kan läsa den svenska texten kan bara genom att bläddra igenom boken och njuta av bilderna, som gryddar innehållet, avundas dem som förstår svenska.

Lars Forsman berättar om hur han själv träffade på språket esperanto. Han nämner sina starka fördomar, som fjättrar och bromsar en fri nyfikenhet. Vägen till att lära esperanto är oftast inte slät och väl stenlagd, utan har många hinder och svårigheter i form av fördomar. Små, betydelsefulla detaljer griper läsarens uppmärksamhet, när han följer studenternas äventyr i Karlskoga. Redan från början blit ett internationellt synsätt viktigt, eftersom studenterna kommer från många olika nationer och länder. Esperanto har under många år undervisats enligt en speciell metod sk naturmetoden. En ungrare Andreo Cseh, uppfunnen den på 1920

talet och alla studenterna i Karlskoga studerade enligt den.

Under 15 år studerade ungdomar från 40 länder esperanto vid Karlskoga Folkhögskola. Många kända språkpedagoger och fackmän inom språket esperanto besökte skolan. Internet skapade nya möjligheter för studierna. Kursdeltagarna lärde känna helt nya dimensioner vid sina datorer. En ny lockande värld öppnade sig för de universitet, som undervisar i esperanto. Esperantos litterära mosaik från hela världen är mångfacetterad och färgrik. Diktatorer som Stalin och Hitler försökte utrota esperanto från jordens yta, men deras försök gick om intet.

Jag är mycket lycklig över att jag kan läsa och förstå svenska. Våra grannar i Sverige och svensktalande i Finland måste känna sig nöjda över att de har fått så innehållsrik bok om esperanto. Tveka inte, läs den – du kommer att bli förvånad. Kasta bort dina eventuella fördomar och gå på äventyr tillsammans med Lars Forsman. Du kommer inte att ångra att du sitter vid kvällslampan med den professionella guiden från Karlskoga.

Jorma Ahomäki

*Översättning från esperanto till svenska
Kerstin Rohdin*

Lars Forsman:
”Esperanto...över 50 miljoner träffar”
978-91-633-7347-3

Beställningar:
Lars Forsman, Enbärsvägen 17, 69 147 Karlskoga, tel 46 586-548 11, e-mail: larsespo@yahoo.se

Historio de la nobla koridalo

La historio de la nobla koridalo (*Corydalis nobilis*) estas tiom speciala, ke indas rakonti ĝin. Ankaŭ la planto mem estas speciala, ĉar ĝi estas unu el la reprezentantoj de la t.n. printempa aspekto. Per tiu nocio nordlandaj botanikistoj celas plantojn, kiuj kreskas kaj floras tre frue printempe. Ili maturigas la semojn kaj forvelkas antaŭ ol foliarboj havos plenajn foliojn, kiuj poste malhelpos al surteraj plantoj ricevi rektan sunlumon.

La nordlanda historio de la nobla koridalo komenciĝas en la jaro 1765 en Meza Azio. La sveda botanikisto Carl von Linné (laŭ Vikipedio esperante Karolo Lineo) jam komencis sian laboron kaj petis siajn amikojn kaj lernantojn tra la mondo sendi al li semojn de diversaj plantoj. Unu el ili estis la finna pastro kaj sciencisto Erik Laxman (artikolo pri li en Wikipedia en pluraj lingvoj, i.a. en la finna, sveda, angla kaj rusa, serĉu per Erik Laxmann), kiu tiutempe havis pastran oficon en la urbo Barnaul ĉe la rivero Ob en Meza Siberio. Ankaŭ lia historio estas interesa, ĉar li estis inteligenta homo, sed pro manko de mono ne povis studi en la universitato de Turku. Li tamen eklaboris kiel helpanto de pastro en Ingrio. Poste li estis ordinata pastro kaj laboris en Sankt-Peterburgo. En



Vi eble miras, kial estas truo en unu floro. La floroj estas tiom longaj, ke burdoj ne kapablas suĉi nektaron el ili. Tial ili simple mordas la floron kaj ŝtelas la nektaron.

1764 li estis sendita al Barnaul. Poste li fariĝis rekonita sciencisto, eĉ profesoro pri kemio kaj ekonomiko en la rusa akademio de la sciencoj.

Linné vidis en rusa herbario specimennon de planto ĝis tiam nekonata en Eŭropo. Ĝi estis *Lamprocapnos spectabilis*, kies komunua nomo en esperanto estas korfloro aŭ sanganta

koro (finne *särkynytsydän*, svede *löjtnantshjärta*). Li petis sian finnan amikon sendi al li ties semojn.

Laxman trovis la planton en la regiono de Tomsk kaj sendis semojn al Svedio, kie Linné plantis ilin en sia ĝardeno. Post kvar jaroj la planto unuafoje floris kaj tiam evidentiĝis, ke ne temas pri la sanganta koro. La folioj estis tre similaj al tiu, sed la floroj ne. Linné studis tiun ĉi novan planton kaj nomis ĝin *Corydalis nobilis*, nobla koridalo.

Nobla koridalo prosperis en la nordlanda klimato, kiu verŝajne iom similas al la origina klimato piede de la Altaj-montaro. Unue oni plantis ĝin al ĝardenoj de sinjoraj bienoj, sed poste ĝi kelkloke saltis ankaŭ al la sovaĝa naturo. Tiel okazis nur en kelkaj lokoj, kie la klimato estas taŭga por la planto, en Svedio ĉefe en la Stokholma regiono, en Finnlando en la plej sudaj regionoj. En Helsinko estas pluraj lokoj, kie oni povas trovi noblan koridalon en la naturo, ekz. en la botanika parko de Kaisaniemi (kvankam temas pri botanika ĝardeno, la koridaloj ne kreskas en hompreparita bedo, sed libere en la parko laŭ sia propra bontrovo). Alia facile vizitebla loko estas la tombejo de Hietaniemi.

Se vi interesiĝas pri tiu planto, ĝuste nun estas bona momento vidi ĝin (en Stokholma regiono verŝajne jam plene, ĉe ni en Sud-Finnlando nur en sunaj lokoj, ĉar ĉi-jare la printempo malfruas) kaj post du semajnoj vi povas jam kolekti semojn. Laŭdire estas facile kreskigi ĝin de semoj, sed ial mi neniam sukcesis, do mi profitas de tiuj lokoj, kiujn la planto mem elektis.

P.S. Eble vi volas scii kio okazis al Linné kun sanganta koro? Li neniam vidis ĝin kreskanta, ĉar ĝi venis al Eŭropo unuafoje nur en 1846, kiam la brito Robert Fortune portis ĝin el Ĉinio. Linné mortis jam en 1778.

Sakari Kauppinen

(laŭ <http://www.ipernity.com/blog/138894/249958>, 14a de majo 2010)



Pönttökuume

Kevään tullen monille meistä tulee autokuume, joillekin toisille se voi olla "pönttökuume". Auringon alkaessa sulatella talven lumia on sopiva aika tehdä uusia linnunpönttöjä. Pönttöjen rakentelun ei tarvitse olla ollenkaan totista touhua vaan sisäänkäyntejäkin voi olla vaikkapa kaililla neljällä sivulla! Terveisin!

*Kimmo Hakala
Syvälahden Pajutila, Vesanto*



Runeberg (avo) denove

La plej konata poemo de la plej majstra manipulanto de la sveda lingvo en sia epoko, Johan Ludvig Runeberg (1804–1877) estas sendube *Bonden Paavo* (Kampanano, terkulturisto Paŭlo) en finna versio konata kiel Paavo el Saarijärvi. Des malpli konata estas alia Paŭlo, *Ojan Paavo*, el la sama junaĝa kolekto *Idilioj kaj epigramoj*. Kial – evidente tial, ke Paŭlo de Saarijärvi reprezentas la tiel nomatan nacian romantikon, per kiu estis konstruata sento pri finnlanda komuneco, dum Paŭlo de Oja reprezentas nur romantikon. Jen provo redoni; la originalo troviĝas rete en http://sv.dikt.org/Idyll_och_epigram. – numero 27.

tg

27

*Grandstatura estis Ojan Paavo,
Vir' el Tavastio de Finnlando,
Stabile staris kiel rok' picea,
Ŝtormrapida, forta kuraĝulo.
Ursojn li per nura braka forto
Supervenkis, ŝiris altajn pinojn
El la ter', ĉevalojn levis alten,
Faligis fortajn virojn kiel herbon.
Staris nun la forta Ojan Paavo
Alta kaj fiera dum foiro,
Staris meze de la homamaso
Kiel la reĝpino en arbaro;
Sed ekvoĉis laŭte kaj eldiris:
Se ĉi tie estas iu homo,
Kiu tenas min en unu loko,
nur momente min de mov' haltigus;
Tiu prenu tuj bienon mian,
Tiu gajnu miajn ortrezorojn,
Tiu havu ĉiujn miajn bestojn,
Kaj mi estu ties korp-anime.
Tiel diris forta Ojan Paavo;
Sed junuloj timigitaj staris,
Kaj silentis al la fierulo,
Ne kuraĝis iu lin renkonti.*

*Admirante kaj ameme vidis
Junulinoj lin, la batalanton;
ĉar li staris, forta Ojan Paavo
kile alta pin' en junarbaro,
Brulis la okuloj kiel steloj,
Brilis lia frunto kiel suno,
Kaj la blonda haro sur la ŝultrojn
Falis kiel la kaskado ŝaŭmas.*

*Sed el inter la virinoj Anna,
La plej ĉarma junulin' vilaĝa,
Belaspekta kiel matenruĝo,
Iris sen hezit' al Ojan Paavo,
ĉirkaŭis molebrake lian kolon,
Proksimigis koron al la koro,
Premis lian vangon al la sia
Kaj lin petolpetis flankmoviĝi.
Sed venkita staris la forto
Tute ne povante sin formovi.
Kapitulacis, diris al l'knabino:
Tuj posedu vi bienon mian,
Viaj estu miaj ortrezoroj,
Viaj estu ĉiuj miaj bestoj,
Kaj mi estas via korp-anime.*

Eventokalendaro de EAF

- 10.–12.6. Antaŭekskurso de kursosemajno (Naantali, Turku)
- 12.–17.6. Esperantokurso en Popola instituto de Valamo
- 2.7. Eukonkanto (porti virinon) -festivalo en Sonkajärvi
- 23.–30.7. UK en Kopenhago, karavano el Finnlando
- 10.–11.9. Aŭtunaj Tagoj de EAF en norda Finnlando (Tornio/Haparanda)

Valamon kurssi ja retki kesäkuussa 2011

Valamon kesäkurssi on tänä vuonna kuten ilmoitettu 12.–17.6.2011 ja sitä ennen on perjantaina 10.6. retki Naantalın muumimaailmaan. Turkuun tutustutaan 11.6. ja 12.6 Turussa olevat kurssilaiset matkustavat täältä Heinävedelle. Muutaman suomalaisen lisäksi Valamoon on ilmoittautunut pari ulkomaalaista naapurimaasta ja kauempaakin. Pääopettajana on tänäkin vuonna Atilio Orellana Rojas, joka nykyään asuu Japanissa.

Pyydä kurssiviikon ohjelma Tiina Oittiselta (kurssivastaava) tai tulosta se netistä. Tiinalta saat myös ulkomaalaisille tarkoitettun ilmoittautumislomakkeen. Etukäteisretken ilmoittautumiset myös Tiinalle, muuten suomalaiset ja somea osaavat voivat ilmoittautua suoraan Va-

lamoon. Kerro kuitenkin meille tulostasi, jotta voimme suunnitella kurssiviikon ohjelmaa.

Valamon luostarin ja kansanopiston tiedot:

Valamon kansanopisto, Valamontie 42, 79850 Uusi-Valamo. Puh. (017) 5701 810 (myyntipalvelu, klo 9–16). Sähköposti: opisto@valamo.fi, kotisivu www.valamo.fi, sivun kautta löytyy kansanopiston ilmoittautumislomake. Katso myös Heinäveden kunnan sivuja www.heinavesi.fi, siellä on tutun lipun alla tietoja esperantoksi.

Kurssin yhteyshenkilö: liiton kurssivastaava ja sihteeri Tiina Oittinen (puh. 050 549 4709 tai eafsekretario@esperanto.fi, muut yhteystiedot lehden sivulla 2).

Valamo-kurso kun antaŭekskurso junio 2011

Nia internacia kursosemajno 12.–17.6.2011 estos ĉi-somere denove en la Popola instituto de Valamo, kiu situas en la mirinda monaĥejo areo. Antaŭe ni ekskursos en Muminmondo de Naantali 10.6. kaj en la kultura ĉefurbo Turku 11.6. Dimanĉe 12.6. estos komuna vojaĝo trajne el Turku al Heinävesi. Kursanoj venos kaj el Finnlando kaj el aliaj landoj. La ĉefinstruisto estas ankaŭ ĉi-jare Atilio Orellana Rojas, kiu nun loĝas en Japanio.

Petu la kursoprogramon de Tiina Oittinen, kiu estas kursorespondeculo de EAF. Vi trovos ĝin ankaŭ en la reto. Vi povas aliĝi kaj en la antaŭekskurso kaj en la kursosemajno de Valamo tra EAF, ni peros viajn mendojn al Valamo. Se vi scipovas la finnan, vi povas esti ankaŭ en rekta kontakto al la Popola instituto, sed tie ne estas esperantoparolantoj. Esperantlingvajn sciojn pri la komunumo Heinävesi, kie la monaĥejo de Valamo kun la popola instituto situas, vi trovos en retpaĝo www.heinavesi.fi, klaku la flagon.

Kontaktulo estas kursogvidanto Tiina Oittinen, sekretario de EAF, adreso: Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku, Finnlando, tel: +358-2-2305319, eafsekretario@esperanto.fi. Petu de ŝi aliĝilon kaj programon. Pliaj informoj ankaŭ en www.esperanto.fi.

Bonvenoj novaj kaj malnovaj Valamo-anoj! Rakontu pri la kurso kaj antaŭekskurso al viaj gekonatuloj!



Karavano al Kopenhago BK5 ekiros Karavaani BK5 Kööpenhaminaan matkalle

21.7.–31.7.2011 (UK 23.–30.7.)

Preskaŭ certas ke la ĉi-jara karavano ekstartos laŭplane la 21-an de julio. En la listo estas nun 19 nomojn. Ŝanĝo okazis en la reveturo, kiu estos nun jam sabatmatene tiel ke reveno en Turku haveno estos jam vespere en la 31-a de julio. La hotelo en Kopenhago estos Best Western Hotel Hebron, osoite on Helgolandsgade 4, Copenhagen 1653. En Svedio la itinero estas ankoraŭ prilaborata. Eblas ankoraŭ informiĝi pri partoprenado. Tuj kontaktu la kontaktulojn, se vin interesas.

Karavaanimatkalle on nyt lähdössä 19 henkilöä, joten se on toteutumassa. Matkan paluuta on muutettu siten, että lähtö Kööpenhaminasta on jo lauantai-aamuna 30.7. ja paluu Turkuun tapahtuu 31.7. päivälaivalla. Hotelli Kööpen-

haminassa on Best Western Hotel Hebron, osoite on Helgolandsgade 4, Copenhagen 1653. Ruotsin reitin suunnittelu on vielä kesken. Voit vielä kysellä yhteyshenkilöiltä mahdollisuutta osallistua matkalle, mutta toimi nopeasti.

Yhteyshenkilöt / Kontaktuloj

Suomen Esperantoliitto ry / Esperanto-Asocio de Finnlando

Tiina Oittinen, sihteeri, sekretario, tel: (02) 230 5319, 050 549 4709, cafsekretario@esperanto.fi

Päivi Saarinen, vicprezidanto, varapuheenjohtaja, cafmen DOJ@esperanto.fi

(pliaj kontaktinformoj sur paĝo 2, ks. lisätietoja lehden sivulta 2)

Bonvenon al Sonkajärvi por la monda konkurso de edzinportado 1–2.7.2011!

La monda konkurso de edzinportado estas longa tradicio en Sonkajärvi, kiu situas ĉirkaŭ 25 km nordoriente de Iisalmi, en Norda Savonio. Teamoj alvenas el multaj landoj. Viro devas portisian edzinon (aŭ iun ajn virinon) rapide tra mallonga kurejo – super bariloj kaj tra akvo.

Ĉijare almenaŭ unu Esperanto-teamo partoprenos! Ĉu vi ankaŭ deziras partopreni?

Eksterlandaj gastoj estas speciale bonvenaj por partopreni! Venu kaj ĝuu amuzan etoson! Se vi mem ne partoprenos la konkurson, venu kaj subtenu nin laŭvoĉe en la konkurso de plivigligantoj! Vespere okazos danco kun kantistoj *Suvi Teräsniiska* [unu de la pintaj stelulinoj de

popmuziko] kaj *Tommi Soidinmäki* [tangoreĝo de 2004 kaj kantisto].

Tiu ĉi internacia evento estas bona okazo por varbi pri Esperanto. EAF havos budon dum la evento.

Feliĉo (Onni Kauppinen) de Iisalmi bonkore invitas gastojn. Kunlabore kun FEJO estos aranĝita samtempe tendaro ĉe la bela bieno de Feliĉo – apud la pura lago kun finna saŭno.

Por plu da informoj pri biletoj kaj aliĝo, bonvolu viziti www.eukonkanto.fi -paĝojn aŭ kontakti Keke Uber ĉe keub@uea.org +358 40 413 4252.

Esperanto-Asocio de Finnlando
Suomen Esperantoliitto ry.

Agadplano por la jaro 2011

Antaŭvideblas ordinara jaro. Laborilojn ni jam havas iujn novajn kaj estas dum la jaro havontaj pliajn.

La bazaj funkcioj

La estraro kunvenas minimume sesfoje kaj decidas laŭ la regularo, agadplano kaj buĝeto. La oficejo kun biblioteko kaj arkivo estas ordigita. La arkivero ne aktuala estas transportita al la stokejo en Pori, la historie kaj kulture valoraj arkivoj estas sekure konservitaj laŭeble en Ŝtata Arkivo. La reordigo de la asocia retpaĝo estas kompletigita.

Vintraj Tagoj kun jarkunveno estas en marto en Tampere kaj Aŭtunaj Tagoj en septembro en norda Finnlando laŭeble en kunlaboro kun la Svediaj najbaroj. Aŭtunaj Tagoj havas karakteron turisman, sed ankaŭ kulturan kaj lingvopolitikan pri la multetna Nordo. Komence de julio ni sendos grupon al Eukonkanto-festivalo en Sonkajärvi.

Zamenhof-festo en decembro koincidas kun la 50-jara jubileo de la E-Societo en Turku, kiu cetere estas ĉijare kultura EU-ĉefurbo. La asocio utiligas la okazojn por popularigo de Esperanto.

La bezonoj de la membraro kaj de publiko

Membroj kaj produktas kaj aĉetas, klientoj – publiko – aĉetas servojn kaj produktaĵojn. Tiuj estas libroj, diskoj, gazeto, retpaĝo, kluba vivo, kursoj, vojaĝoj. La asocio disponas pri kompetentaj profesiuloj en propra membraro. Interesita publiko meritas bonkvalitajn servojn.

Instruado, eldonado kaj ekonomio

La ĉefa kursaranĝo estas la somera kurso en la popolaltlernejo de Valamo. Ĝia efektivigo estas de prioritata graveco por la asocio. La asocio subtenas siajn memrosocietojn en kursaranĝoj. E-ku-listo estas daŭre aktualigata. La kurso de KSV-Etäopisto kaj la retkursoj lernu! kaj elementa kurso de Rauhamaa estas reklamataj en la asocia informado.

Esperantolehti – Esperantobladet – Esperanta Finnlando estas daŭre trilingva laŭ sia titolo kaj aperigas ankaŭ nacilingve por respondi al sia ambicia subtitolo ”kultura periodaĵo lingvopolitika”. Ĝi aperas en 6 jaraj numeroj, el kiuj unu povas esti duobla numero, se necese pro la ekonomio; tiukaze la duobla numero estas pli ampleksa.

Post la aperigo de finnlingva Zamenhof-biografio (*Tohtori Zamenhof ja kansainvälinen kieli. Yhteiskielen laatijan elämä ja aatteet: Esperanto kielenä ja kulttuuri-ilmionä*) kaj havante tri lernolibrojn, du retkursojn kaj korespondan kurson, plej grava verka kaj eldona tasko estas vortaro aŭ vortaroj finna-esperanta-finna, projekto kiu tro longe stagnis. La vortaron aŭ vortarparon ni celas eldoni en 2012.

La asocio konstruas la buĝeton de 2012 sen defcito.

Internaciaj kaj eksteraj rilatoj

Nia agado etendiĝas al la Finnlanda kultura kaj civitana vivo. La asocio subtenas partoprenon de siaj membroj en eventoj kaj diskutoj lingvakaj kulturpolitikaj. Ni havas ĉie eksterlandajn amikojn. Vivaj internaciaj rilatoj interhomaj estas nia peresperanta kaj kreo de rilatoj inter organizaĵoj por antaŭenigo de niaj idealoj nia poesperanta celo.

Esperanto-Societo en Turku – someraj renkontiĝoj

Niaj ĉiusemajnaj renkontiĝoj daŭras merkrede proksimume inter 16.30 kaj 17.30 en la kafejo Sirius de la ĉefbiblioteko de Turku en Linnan-katu 2. Gastoj estas ĉiam bonvenaj tiam kaj ankaŭ dum aliaj tempoj.

En la 24-an de majo (mardo) ekde la 17a ni vizitos la kulturen centron Logomo kaj rigardos kun ĉiĉeronoj Leena kaj Tiina la ekspozicion "Fajro, fajro!" Enirpago varias inter 8 kaj 20 eŭroj, depende de tio kion vi deziras vidi kaj kiujn rabatojn vi eble ricevas.

Komence de junio venos eksterlandaj gastoj en Turku survoje al Valamo-kurso. Vi povas ekskursi kun ni al la Muminmondo de Naantali vendrede la 10-an de junio kaj verŝajne denove al Logomo la 11-an de junio. Bonvolu informiĝi pli de ni.

Por certiĝi, ke vi vidos niajn membrojn, bonvolu kontakti kun la prezidanto, vicprezidanto aŭ sekretario de EST (Tiina Oittinen, tiina.oittinen@pp.inet.fi aŭ tel. 050 549 4709 aŭ Anna-Liisa Ali-Simola, tel. 040 554 1680 aŭ Leena

Tiusanen, tel. 050 575 7956, leena.tiusanen@elisanet.fi).

Turun Esperanto-yhdistyksen jäsenet tapaavat lähes viikottain pääkirjaston kahvila Sirkukseen keskiviikkoisin noin klo 16.30–17.30.

Toukokuussa (24.5. klo 17–19) vierailemme kulttuurikeskus Logomossa ja tutustumme opaiden johdolla näyttelyyn Tuli on irti! Sisäänpääsy 8–20 euroa riippuen siitä mitä haluat nähdä ja myös mahdollisista alennuskorteista.

Kesäkuun 9. ja 10. päivä Valamoon matkalla olevat ulkomaiset kurssilaiset vierailevat Turun seudulla. Ohjelmassa on retki Naantalin Muumimaailmaan ja mahdollisesti taas Logomoon.

Vierailijat tervetulleita, varmista kuitenkin aika ja paikka! Lisätietoja joko pj Tiina Oittiselta, tiina.oittinen@pp.inet.fi tai puh. 050 549 4709 tai vpj Anna-Liisa Ali-Simolalta, puh. 040 554 1680 tai siht. Leena Tiusaselta, tel. 050 575 7956, leena.tiusanen@elisanet.fi.

Esperanto-Societo en Turku fariĝos 50-jara

Kiel nia alestimata vicevizoro informis en EF 1/2011, nia societo estis fondita en aprilo 1961. Ni festos la okazon tamen en decembro kaj elektis kiel festotagon la 15-an de decembro. La loko estos la nuna hotelo *Scandic Plaza*, antaŭ 50 jaroj konata per la nomo *Hospits*. Tie ja estis fondita Turun Esperanto-yhdistys – Esperanto-Societo en Turku ry.

Vi estas elkore bonvenaj al la vespera festo. Pli detalajn sciojn pri la programoj, pri pladoj kaj aliaj aranĝoj vi povos legi en la sekvaj numeroj de Esperanta Finnlando kaj rete. Kaj kompreneble ni informos vin dum la someraj kaj aŭtunaj renkontiĝoj.

Kuten jo edellisessä numerossa kerrottiin, yhdistyksemme perustamisesta tulee tänä vuonna kuluneeksi 50 vuotta. Juhlapaikaksi olemme valinneet Scandic Plaza -hotellin, jossa yhdistyksemme perustettiin huhtikuussa 1961; silloinhan hotelli tunnettiin nimellä Hospits. Juhlailta on 15.12.2011. Tarkempia tietoja juhlaohjelmasta, ruokailusta ja muista asioista saatte Esperantolehdestä, netissä sekä tapaamisissa. Tervetuloa juhlimaan kanssamme!

Estraro de EST



Antaŭen 90-jara

Esperantoseura Antaŭen r.y., Esperanto-societo Antaŭen – estas fondita, registrita en la jaro 1921. Tiujare ĝi ricevis la nomon Tampereen Työväen Esperantoseura Antaŭen r.y., Laborista Esperantosocieto Antaŭen de Tampere. Jam antaŭ tio aperis kaj malaperis esperanto-grupoj unu post la alia.

Post la militoj en Tampere aktivis du esperanto-societoj, Antaŭen kaj Nesto, Tampereen yleinen esperanto-yhdistys, kiuj en praktiko havis la samajn funkciulojn. En la jaro 1972 la du societoj unuiĝis kaj prenis la nomon Tampereen Esperantoseura r.y., Esperantosocieto de Tampere. Poste en la 1980aj jaroj la nomo mallongiĝis al Esperantoseura Antaŭen r.y.

Instruado en Laborista Instituto komenciĝis en 1945 kaj daŭris ĝis printempo 2001.

En la 1950aj kaj -60aj jaroj oni prezentis Esperanton diversmaniere, ekzemple en radio kaj en la nova TES-televideo. Poste oni aranĝis

ekspoziciojn kaj partoprenis en okazaĵoj en la urbo.

La plej grava informilo estis la klubgazeto Vekilo. Ĝi aperis de 1963 ĝis 2008. Ĉiuj membroj kaj en Finnlando funkciantaj esperantosocietoj aŭ grupoj ricevis ĝin. Vekilo estis sendita ankaŭ al la societoj en ĝemelurboj de Tampere.

En la jaro 1987 Antaŭen aranĝis la 100-jarjubileon de Esperanto kaj pluraj Vintraj kaj Aŭtunaj Tagoj de EAF estas aranĝitaj ĉi tie. La plej grava komuna entrepreno de finnaj esperantistoj estis la Universala Kongreso en 1995 en Tampere-halo. Por memoro pri tiu granda okazo staras Esperantoarbo, speciala betulospeco de Pirkkala, en la apuda parko de Tampere-domo.

Neston, nian klubejon, ni havigis post la kongreso (1997). Ĝi estas loko por diversaj kunvenoj kaj la libraro de pli ol 2000 titoloj, kiuj ĉefe estas hereditaj aŭ donacitaj.

En Nesto estas deĵorado ĉiulunde je la 16a–17a horo.

Sylvia Hämäläinen, sekretario

ELFI informas

Ĝis la jarkunsido en 2012 en la estraro de ELFI funkcias kiel prezidanto-sekciestro Sylvia Hämäläinen, vicprezidanto Raita Pyhälä, sekretario Tapani Aarne kaj membroj Harri Laine kaj Tiina Oittinen. Vicestraranoj estas Tuomo Grundström kaj Carola Antskog. Kasisto (nemembro) estas Terhi Laaksonen.

La membronombro ĉijare estas 18.

Membrokotizo estas 26 e MIPR (IPR papere), 26 e MJA (IPR rete kaj Juna amiko), 13 e MI (IPR rete). Kiel membro de ELFI oni povas abonati Esperantolehti kontraŭ 14 e.

ELFI estis fondita antaŭ 90 jaroj. La estraro planis por ĉi tiu jaro havigi historieton de ELFI. La prezidanto havas ĉe si la konservitajn dokumentojn. La historieto estos esperantlingva kun finna kaj sveda resumoj kaj la plano estas,

ke ĝi pretiĝos ĝis aŭtuno. Dum Aŭtunaj Tagoj ni aranĝos ian programeron. Ni planis ankaŭ aranĝi seminarion por instruantoj de Esperanto kaj voki konatan eksterlandan instruiston. Tio tamen ne plu sukcesos ĉijare, sed verŝajne venontjare.

La ILEI-konferenco okazos en Kopenhago 17.–22.7., semajnon antaŭ la UK 23.–30.7. En ĝi povas partopreni krom la komitatanoj (elektitaj reprezentantoj) ankaŭ aliaj, kiuj interesiĝas pri instruado. Sylvia Hämäläinen kaj eventuale ankaŭ Carola Antskog prezentos ELFI en la konferenco de ILEI. Almenaŭ Synnöve Myntinen partoprenos. Ĉu estas aliaj? Sciojn pri la konferenco vi trovas en IPR 10/4 kaj 11/1 kaj en <http://www.ilei.info/agado/Kopenhago2011.php>.

Sylvia Hämäläinen

Uudista Esperanto-lehden tilaus

Näin jatkat helposti lehden tilausta vuonna 2011, jollet ole sitä jo tehnyt.

Huomaa, että hintamme ovat pysyneet samoina kuin viime vuonna:

Suomen Esperantoliiton henkilöjäsen (individua membro)

- ♦ Lehtimaksu sisältyy jäsenmaksuun, joka vuodelle 2011 on 20 euroa.
- ♦ Viimevuotiset jäsenet saavat muistutuskirjeen ja viitenumeron liiton rahastonhoitajalta.
- ♦ Uusi jäsen: ilmoita osoitetietosi liittoon (yhteystiedot lehden sivulla 2).

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestön jäsen

- ♦ Lehtimaksu on 14 euroa.
- ♦ Jäsenjärjestöjen yhteystiedot ovat takakanen sisäsivulla.
- ♦ Maksa lehti omalle jäsenjärjestöllesi yhdessä jäsenmaksun kanssa (huomaa, että joidenkin järjestöjen jäsenmaksuun lehti sisältyy automaattisesti). Hoida maksu yhdistyksesi ilmoittamaan eräpäivään mennessä.
- ♦ Suomen Nuorten Esperantoliiton (FEJO) varsinaisille jäsenille lehden hinta FEJOn kautta tilattuna 10 euroa.

Lahjatilaukset ja lisälehdet

- ♦ Lahjatilauksena lehden vuosikerta maksaa 22 euroa. Lisälehdillä sama hinta.
- ♦ Voit maksaa lahja/lisätilauksen joko liittoon tai jäsenjärjestösi kautta.

Huomaa, että tämä lehti nro 2/2011 on viimeinen, jonka lähetämme vuonna 2011, jos tilausta ei ole uudistettu.

Hyviä lukuhetkiä!

Reabonu Esperanta Finnlando por 2011, jam temp' esta'!

Vi rimarkas, ke nia prezoj ne altiĝis de lastjare. Se vi jam reabonis, koran dankon!

Se vi estas individua membro de Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF):

- ♦ Esperantolehti/Esperantobladet/Esperanta Finnlando estas inkluzivita en la membrokotizo 20 eŭroj.
- ♦ Tiuj, kiuj estis membroj lastjare, ricevos de la kasisto leteron kun pagilo kaj referencnumero.
- ♦ Nova membro: informu vian nomon kaj adreson al EAF (kontaktinformoj en paĝo 2).

Se vi estas membro de iu membroasocio de EAF (rigardu la liston en antaŭlasta paĝo):

- ♦ Esperantolehti kostas por vi 14 eŭrojn.
- ♦ Pagu al via membroasocio kune kun la membrokotizo (notu ke kelkaj membroasocioj aŭtomate inkluzivas la gazeton en la membrokotizo). Certe jam alvenis la pagilo de via asocio.
- ♦ Notu, ke por ordinaraj FEJO-anoj abonantaj tra FEJO la abonkotizo estas 10 eŭroj.

Se vi deziras faris donacabonon aŭ mendi kromajn gazetojn por via uzo:

- ♦ Esperantolehti kostas tiam 22 eŭrojn.
- ♦ Vi povas pagi aŭ al EAF aŭ tra via membroasocio.

Notu, ke tiu ĉi numero 2/2011 estas la lasta kiun vi ricevas en 2011 sen reabono.

Ĝuu la legadon!



Poimin *Eesti Päevaleht*-nettiversiosta (11.4. 2011) Esperantoon liittyvän mielipiteen. Käänsin tekstin suomeksi. Kirjoittajan käsityksiä ja lukuja punnitkoon jokainen haluamallaan tavalla. Hyvä, että Esperantoa pidetään esillä. – *Erkki Röntynen*

Esperanto õppekavasse

Miks peab kogu maailma ühiskeeleks saama inglise keel, mis on emakeeleks ainult seitsmele protsendile maakera elanikest? Väidetakse, et nii on läinud ja teist teed ei ole. On küll, selleks on inglise keelest tohutult lihtsam esperanto. Kui esperanto aktiivselt kasutusele võtta, võiks viie või kümne aasta pärast vabalt suhelda kogu Euroopas. Ning ka Tais või Egiptuses, kui seal nähakse, et eurooplastega saab kõige paremini jutule just esperantos. Esperanto rääkijaid on maailmas üle kümne miljoni. 2004. aasta aprillis toetas esperanto kasutuselevõttu Euroopa Parlamendis 43% saadikutest. Nüüd peaks toetus olema suuremgi, kuna on lisandunud 12 mitteingliskeelset liikmesriiki. Sobiv võimalus meie praegustel või tulevastel europarlamenti liikmetel asi algatada. Enne kui minna ettepanekuga esperanto kasutuselevõtuks Euroopa Liitu, ÜRO-sse või UNESCO-sse, tasuks tõestada tema elujõudu meie väikses rahvusriigis ja lähiumbruses. Võtta esperanto kõigi astmete koolide õppekavasse. Anda välja esperantokeelset ajalehte. Rahvusringhäälingus taastada kunagised esperantokeelsed saated. Anda kordustrüki välja Jaan Ojalo esperanto keele õpik. Julget algust! Ükskord võidab esperanto niikuinii.

Heino Tonsiver

Esperanto opetusohjelmaan

Miksi englannista olisi tullava koko maailman yhteinen kieli, kun vain seitsemän prosenttia maapallon asukkaista puhuu sitä äidinkielenään? Sanotaan, että näin se vain on eikä muuta ratkaisua ole olemassa. Väite on pohjaa vailla. Esperanto on huomattavasti yksinkertaisempi vaihtoehto. Jos Esperanto otettaisiin yleisesti käyttöön, voisivat eurooppalaiset viiden tai

kymmenen vuoden kuluttua vapaasti seurustella keskenään. Näin myös vaikka Thaimaassa tai Egyptissä, kun siellä huomattaisiin, että eurooppalaisten kanssa on vaivattominta keskustella esperantoksi. Esperanton puhujia on maailmassa yli 10 miljoonaa. Vuonna 2004 Esperantoon suhtautui myönteisesti 43 % EU:n parlamentin jäsenistä. Tällä hetkellä luku saataisi olla suurempikin, sillä Euroopan Unioniin on liittynyt 12 uutta ei-englanninkielistä maata. Nyt olisikin sopiva tilaisuus nykyisten ja tulevien parlamentin jäsenten viedä asiaa eteenpäin. Ennen kuin esitetään Esperanton hyväksymistä EU:ssa, YK:ssa tai Unescossa, Esperanton elinvoimaisuus olisi näytettävä toteen meidän pienessä valtiossamme ja lähiympäristössämme. Esperanto olisi otettava kaikenasteisten koulujen opetusohjelmiin. On julkaistava esperantonkielisiä lehtiä ja aloitettava uudelleen esperantonkieliset lähetykset. Tarvitaan myös uusintapainos Jaan Ojalon Esperanton kielen oppikirjasta. Pelotonta alkua! Jossain vaiheessa Esperanto menestyy tavalla tai toisella.

Heino Tonsiver

Nova retradio

La aŭstro Anton Oberndorfer kreis novan retan radiopaĝon *aldone.de/retradio*, kie li ĉiutage aldonas novan tekston, kiun li laŭtlegas per modela prononco. Tiu speco de podkasto aŭ voĉa blogo donas al lernantoj belegan eblecon ekzer-ci leg- kaj aŭdkomprenon. La tre variaj (apenaŭ primovadaj) temoj montras la taŭgecon de Esperanto en ĉiuj vivosferoj. Tre rekomendinda iniciato, eblas aboni la pecojn kiel RSS-fluo kaj facile sekvi la epizodojn.

Certaj signoj de printempo

Jen libereta traduko de artikolo en "Kau-punki-Uutiset" (Turku) de la 17a marto 2011.

Certa signo de printempo estas en ajna loka gazeto rakonto pri hundofekajtoj. Ĉiam, kiam la neĝo komencas degeli, la vintre deponitaj amasetoj venas al la atento kaj postlasas siajn spurojn ĉe la loĝantoj.

Kiel eksa hundoposedanto mi diskutis la kon-
dutregularon kaj ĝiajn bazojn dum kelka jaro. Laŭ mi iĝis klara, ke en la leĝaro mankas jenaj aldonaj paragrafoj:

§1 Hundofekajton ne necesas forigi dum vin-
tro, ĉar feko degelas kune kun la neĝo.

§2 Hundofekajton ne necesas forigi dum mal-
helo, ĉar ĝi magie malaperas antaŭ tagiĝo.

§3 Hundofekajton ne necesas forigi, se la pie-
doj de la hundogvidanto pro la forigo malsek-
iĝus en la neĝo.

§4 Hundofekajton ne necesas forigi, kiam la
hundo laksas. Ĉio havas limojn.

§5 Hundofekajton ne necesas forigi, kiam ha-
zarde fekaĵsaketoj ne estas ĉemane.

§6 Hundofekajton ne necesas forigi, kiam la
hundo estas malpli alta ol genuo. Tia hundo fa-
ras tiom malgrandan fekaĵon, ke ĝi ne kalkul-
indas.

§7 Hundofekajton ne necesas forigi, kiam la
hundo estas pli alta ol genuo. La fekaĵo de tia
hundo estas tiom granda, ke eblas rigardi ĝin
sterkaĵo.

§8 Hundofekajton ne necesas forigi en ne-
flegata verdaĵo. Tia kalkuliĝas verdaĵo, kie la
herbo aŭ alia kreskaĵo estas pli alta ol 5 centi-
metrojn.

§9 Hundofekajton ne necesas forigi por tiuj,
kiuj kredas pri samrajteco de bestoj. Aŭ ĉu vi
iam aŭdis pri saketoj por kato-, kolombo- aŭ
sciurofekajtoj?

§10 Hundofekajton ne necesas forigi, ĉar feko
pli rapide kompostiĝas sur tero ol en saketo.
Tion diras ankaŭ sana prudento.

(Kai Saarto)

Printempaj renkontiĝoj en Helsinko

La estraro elektita en la jarkunveno decidis pri
jenaj aranĝoj ĉi-sezone:

En majo ni invitas vin al ludvespero. Vi
certe konas la popularan televidan programon
"Kymppitoni". Ĉi-foje ni ludos la samon, sed
en Esperanto. Bona okazo uzi sian cerbon kaj
lerni kiel esprimi aferojn sen mencii ilian no-
mon. La ludvespero okazos mardon 10.5. je la
18-a horo en la oficejo.

En junio ni planas fari someran ekskurson al
Luukki, kiu estas naturripozejo de la urbo Hel-
sinko. La planata tago estas dimanĉo 5.6. Pliaj
detaloj venos poste.

Sakari Kauppinen

Juhani Vilkki (6.9.1929–30.1.2011) mor-
tis en Somero 81-jara. Li estis filo de Joel
Vilkki, la longtempa ĉefdelegito de UEA.
Juhani lernis Esperanton jam en junecaj
jaroj same kiel liaj gefratoj, en gvido de
la patro. Ankaŭ li partoprenis kelkajn
Universalajn Kongresojn. Li laboris en la
sepdekaj jaroj en Nova Gvineo kiel agri-
kultura kemiisto en servo de la ŝtato de
Aŭstralio. Poste li dum jaroj vagabondis
en ĉiuj mondpartoj ofte uzante la interna-
cian lingvon kaj trovis plurajn esperantis-
tajn geamikojn. Liaj lastaj malfortaj jaroj
pasis en la hejma urbo Somero.

Heljä Favén, fratino

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset tälle sivulle:

Ilkka Santtila, Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@welho.com.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ www.esperanto.fi/helsinki jukka.p@esperanto.fi (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 ☎ onni.kauppinen@pp.inet.fi
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen) Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 040 867 2743 ☎ www.esperanto.fi/jyvaskyla
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala. ☎ <http://esperantoulu.info/> aini.esp@hotmail.com
- ♦ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla ☎ matti.wallius@ebaana.net
- ♦ Esperantoseura Antaüen ry. / Esperanto-societo Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. ☎ www.esperanto.fi/tampere (pj. tapani.aarne@mbnet.fi ☎ 050 5245 823)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) Teivaalantie 85, 33400 Tampere. ☎ sylvia.h@kolumbus.fi ☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651 ☎ steleto@pp.inet.fi
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ fejo@esperanto.fi. Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoi-

tavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 14 e tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 20 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 40 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on aktiivinen esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu säännöllisesti. Ryhmän yhteystiedot: (Marti Pennanen) Esperantoklubo de Lahti, Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. ☎ marti.pennanen@phnet.fi

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta. ☎ irja.miettinen@pp1.inet.fi, jormato35@gmail.com

Aktiivisia harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Mikkelissä, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2011**
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
3	10.5.	15.5.	en junio
4	10.7.	15.7.	en aŭgusto
5	10.9.	15.9.	en oktobro

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 e	1/1 sivu/paĝo 50 e
1/2 sivua/paĝo 60 e	1/2 sivua/paĝo 30 e
1/4 sivua/paĝo 40 e	1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: eafgazeto@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.



Aŭtunaj Tagoj okazos norde kaj internacie

La Aŭtunaj Tagoj de EAF okazos ĉijare en la duobla urbo Tornio–Haparanda en regiono de la pratempa sveda-finna-samea plurlingvismo. Tio estos ankaŭ parte temo de la kultura-kleriga programo de la Tagoj. Temon al la turisma programo donas la unika naturo kaj malmulte konata historio de la regiono.

Tempo: Semajnfino 10.–11.9.2011. Longan vojon el suda Finnlando estas oportune fari per nokta trajno.

Loko: Haparanda, hotelo *Cape East* (ni pardonu la lingvon), la plej orienta loko de Svedio, vidu <http://www.capeeast.se/fi.aspx>

Prezo: Indikota, sed ni kalkulas laŭ la favora oferto de la hotelo, ke paketo de plena pensio plus programo (aliĝkotizo) restos sub ducent eŭroj.

Venu Finnlandanoj kaj amikoj Skandinaviaj kaj alilandaj. Sekvu pluajn informojn en www.esperanto.fi kaj en Esperantolehti.



Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy kesäkuussa. Jutut 15.5.2011 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en junio. Artikoloj ĝis 15.5.2011 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: <eafgazeto@esperanto.fi>.

Kopio Niini, Tampere 2011